

Geografia nomenklature, 7-a parto
Instruado
Claude Gacond, 288-a radioprelego, 1969.04.16 & 19

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni vin atentigis pri la graveco de la debato malfermita de Tibor Sekelj per la eldono de *Mondmapo* kaj de propono de geografia fundamenta nomenklature.

A.- Pri la geografia nomenklature la instruistaro staras antaŭ nesolvita demando. Ni hodiaŭ ekzamenus tiun problemon.

Cl.- Tio respugligas en la lernolibroj pri esperanto. En la listo de la sufiksoj **uj** estas ĝenerale menciata en la landforma rolo kaj **an** en la loĝantforma rolo. Sekvas kelkaj ekzemploj. Tiam la gelernantoj mire konstatas, ke en esperanto **franco** ne estas la lando, sed la homo. Li lernas la formon **Francujo** por la lando. Li malkovras, ke **Maroko** estas la nomo de la lando, kaj ke la loĝanto estas **marokano**. Multon pli li ne lernas, ĉar ekzercoj mankas.

A.- Pro tio en la kongresoj multaj esperantistoj, kiuj ofte bone majstras la lingvon, misuzas tiujn du sufiksojn. Ili pleonasme uzas la sufikson **an** rakontante pri **svisanoj**, **francanoj**, **rusanoj**.

Cl.- Tiu pleonasmo rememorigas al ni agrablan vesperon. Dana flegistino renkontita dum kongreso en Konstanco estis trovita en alia kongreso en Vieno. Ŝi ofertis al ni kafon, kaj ĉiuj ŝin vokante kriis : **dananino**, **dananino** ! Ekde tiam, kiam ni aŭdas la nuran kaj ĝustan formon **danino**, ŝajnas al ni, ke io mankas en tiu tro mallonga vorto.

A.- Tio estas la problemo de la kutimiĝo al la propraj eraroj. Por eviti tiujn erarojn, en la elementaj kursoj, prefere ol ĉion instrui, oni devus elekti la plej oftajn afiksojn, kaj ekzerciti uzon. Tiuj ekzercoj pri la sufiksoj **uj** kaj **an** ege mankas.

Cl.- Sed la geografia nomenklature ne nur koncernas la landnomojn. La lernantoj devus lerni, kial en la parola aŭ skriba uzo esperantigoj aŭ neesperantigoj de geografiaj nomoj estas subite evitataj. Ili devas scii, kial la en la lernolibroj lernataj vortoj **Parizo**, **Londono**, **Romo**, **Moskvo** malestas en la UEA-dokumentoj profite al la nacilingvaj formoj.

A.- Sed kie trovi la informojn pri tiuj temoj ? Nenia prilingva studo kondukis al minimumaj konkludoj pri la geografia nomenklature en la parola kaj skriba uzoj de la internacia lingvo. Kaj la instruistoj, kiuj sin aventurus en tian instruadon pri la geografia nomenklature, riskus trudi al la gelernantoj personajn gustojn.

Cl.- Ĉiu honesta pedagogo evitas tiujn trudojn. Pro tio la instruantoj jam evitas la demandon **ujo** kaj **io**. Ili plie rezignas paroli pri la temo geografia nomenklature.

A.- Aŭ se ili tuŝas al tiu faka vortaro, ili tion tre supraĝe faras. Nur la trudemuloj provas influi siajn gelernantojn profite al unu el la landformaj sufiksoj aŭ al la esperantigo aŭ neesperantigo de la geografiaj nomoj. Ĉu tiuj truduloj estas honestaj pedagogoj ?

Cl.- Ambaŭ sintenoj estas danĝeraj. Silento estas falsa objektiveco. Trudo estas kaŝita subjektiveco.

A.- Tiu problemo solviĝos en honesta prezento de la demandoj.

Cl.- Dum ni lasas la komencantojn mem trovi regulojn, tiam formiĝas eraraj uzoj, kiuj devigos niajn nepojn lerni malfacilajn gramatikajn regulojn. Ekzemple la artikolo aperas antaŭ kelkaj geografiaj nomoj. La svisoj parolas pri **La Alpoj**, turismaj prospektoj rakontas pri la avantaĝoj de **La Suda Italio**, kaj pli la fluo de **La Rejno**.

A.- En ĉiu lando oni devus konsenti pri minimuma sed norma esperantigo de la geografia nomenklature. Unu el la ĉefregionoj de Svislando estas la montaro nomata en la franca **Le**

Geografia nomenklature, 7-a parto

Instruado

Claude Gacond, 288-a radioprelego, 1969.04.16 & 19

Jura kaj germane **Jura**. La franca adjektivo estas **jurassien**, aŭ en la fako geologio **jurassique**. Pro etimologio la esperantigo devas esti **Juraso**. Tion instruas la vortaroj. Sed la germanlingvaj svisoj tamen daŭre parolas pri la montaro **Jurao**. Kaj la kursgvidantoj tion instruas. Jen la nuna plorinda situacio !

Cl.- La esperantigoj, kiuj ne estas science etimologiaj, mistrafas sian celon. Dum momento ili povos venki. Sed fine ilin la profesoroj pri geografio forlasos.

A.- Ni ne forgesu, ke geografio estas unu el la fakoj, kiuj povus esti instruataj en la lingvo internacia. Bedaŭrinde la *Mondmapo* redaktita de Tibor Sekelj nenion alportas profite al tiu instruado. Sur ĝi troviĝas la minimuma nomenklature ĝenerale instruata en la elementaj lernejoj.

Cl.- Sed se profesoro riskus la instruon de tiu nomenklature dum esperanta geografia kurso, prave lin kritikus kaj la gepatroj de la gelernantoj, kaj la geografoj, kaj la instru-inspektoroj.

A.- En pasinta prelego ni jam kritikis la formojn **Misisipo**, **Misuro**, **Kubo**, **Javo** kaj **Korfo**. Tiuj formoj ne nur estas lingvaj monstraĵoj, ili estas veraj falsigoj.

Cl.- Kiam geografio estos instruata en esperanto, oni devos uzi nomenklaturon universale akcepteblan kaj ne nur praktikatan en fermita esperantista rondeto. Artefarita ĵargono, kiu kripligas geografiajn nomojn universale konatajn, ne venkos. La profesoroj pri geografio, eĉ en esperanto, parolos pri la riveroj **Misisipi** kaj **Misuri**, **pri la insuloj Kuba**, **Java** kaj **Korfu**. Kaj la adjektivoj ne povos esti **misisipa**, **misura**, **kuba**, **java** kaj **korfa** sed **Misisipi-a**, **Misuri-a**, **Kuba-a**, **Java-a** kaj **Korfu-a**.

A.- Ni havos la okazon reveni al tiuj formoj, kiam ni detale raportos pri la tendenco, kiu evitas en la geografia nomenklature ĉiajn kripligojn kaj fermitan ĵargonon.

Cl.- La estonteco de la instruado pri esperanto grandparte dependas, ĉu tiu tendenco sufiĉe rapide estos konata, aŭ ĉu la kripliga tendenco por momento venkos.

A.- Vi konstatas, kiom da demandoj restas sen solvoj. Ili lamigas la instruadon pri esperanto, ĉar ili malhelpas la uzon de nia lingvo por ekzemple la geografia fako.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-